

STARTO

N-ro 2/2025 (295)

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



L. Vignaud, V. Tornillo, A. Švubová, L. Kovář
Nova estraro de IFEF
elektita en Žilina

☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio,
aperas 4-foje jare.

Asocia adreso: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, náměstí Míru 81/1, 568 02 Svitavy, **reta poŝto:** cea@esperanto.cz, ces@esperanto.cz.

Retpaĝaro de ĈEA: www.esperanto.cz
redakce@esperanto.cz

Identec-numero (IČ): 00 44 30 34

Starto retroŝte: starto@esperanto.cz

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

Membrokotizoj: A 350 Kč (Starto elektronike 240 Kč), B 250 Kč (elektronike 140 Kč), C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: Cink: 1160 Kč, 700 Kč (rete), 400 Kč (rete por ĈEA-anoj); Marček: 1360 Kč, 900 Kč (rete), 600 Kč (rete por ĈEA-anoj), Cink por progresintoj 1920 Kč, 1000 Kč (rete), 700 Kč rete por ĈEA-anoj). Aliĝoj: kurzy@esperanto.cz

Libroservo: Muzeum esperanta, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, dvor.libuse@seznam.cz, marie.cumova@seznam.cz.

Sekcioj de ĈEA: katolika, kristana, blindula, grupo por ciferecigo (memstariĝis: handikapitoj, junularo, fervojistoj)

Komisionoj de ĈEA: pedagogia

Muzeo: muzeagrupu@esperanto.cz

Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj:
sufiĉas sendi kopion, skanaĵon, ligan al la gazeta retejo, skribu al:
muzeo@esperanto.cz

BANKO-KONTO de ĈEA:

2800 186 228/2010

Fio banka Svitavy

Výbor ČES:

Předseda: Mgr. Ing. Jiří Tomeček, tel. 602 611 584, tomecek@esperanto.cz; (koordinace a reprezentace ČES, muzeum Svitavy)

Místopředseda: Mgr. Libuše Hýblová, tel. 774 928 974, libusehyblova@seznam.cz (vnější vztahy, UEA, EEU)

Pokladník: Mgr. Andrea Švubová, DiS, svubova@esperanto.cz (evidence a aktualizace členské základny, účetnictví svazu a správa majetku ČES)

Člen výboru: Leonarda Chaloupková, leonarda.ch@seznam.cz (kluby a sekce, konference, granty)

Člen výboru: Mgr. Josef Kalčík, kalcik@esperanto.cz (spolupráce s mládeží, web)

Redaktor Starta: Miroslav Malovec, miroslav.malovec@esperanto.cz (jazyk a historie hnutí, kultura, odborné aplikace, pedagogika)

Čefdelegito de UEA por Ĉeĥio:

Petr Chrdle, Anglická 878,
252 29 Dobřichovice, tel. 736 645 455,
chrdle@kava-pech.cz

UEA-kotizperanto: Ĉeĥa Esperanto-Asocio. La pagojn sendu al la konto de ĈEA (vidu paĝon "Jak platit svazu"). Administras: Petr Chrdle.

Esperanto-Muzeo en Svitavy: Ottendorfer-domo, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, muzeo@esperanto.cz
www.muzeum.esperanto.cz

Facebook kaj Ipernity

www.facebook.com/Esperanto.cz/
www.ipernity.com/home/esperanto-muzeo-svitavy
www.facebook.com/groups/esperanto.muzeo.svitavy/
www.facebook.com/muzeumesperantasvitavy/

Kontrollegis: la komitato, K. Votoček, V. Türk, P. Dvořáková

La vorto de la prezidanto

Estimataj samideanoj,

la tempo kuras fulmrapide kaj jam



venontmonate komenciĝos la 110-a Universala Kongreso en Brno. Kompreneble oni ne povas atendi ĝin pasive. Dek sep homoj, kiuj akceptis rolon en

Loka Kongresa Komitato (LKK), laboras pene pli ol unu jaron dediĉante sian tempon, eĉ monon. Rezultojn de laboro de LKK vi povas jam nun vidi en sociaj retoj (fejsbuko, instagramo, telegramo...), kie regule aperas kontribuoj en Esperanto rilataj al nia lando kaj UK. La kontribuoj aperas trifoje semajne. Sed same grave estas larĝe informi ĉeĥan publikon pri preparo de la kongreso. Membroj de LKK preparas preskomunikaĵojn kaj kontaktas publike konatajn personojn por subteni nian agadon.

Multaj aliaj aferoj estas ankoraŭ nevideblaj, tamen farataj. Ekzemple oni devas prizorgi krom antaŭ- kaj postkongreso pliajn dek kvar tuttagajn kaj pli ol dudek duontagajn ekskursojn. Por ĉiu estas necesa ĉiĉerono kaj tradukanto. Tio signifas trovi sufiĉe da helpemaj kunlaborantoj, kiuj konas Esperanton kaj celon de la ekskurso. Kompreneble helpantoj kun diversaj konoj kaj kapabloj estas necesaj ankaŭ por multaj aliaj laboroj kaj estas necese trovi kaj instrui ilin jam longe antaŭ la kongreso. Tio ĉio estas

horoj kaj horoj da laboro de ĉiuj LKK-anoj.

Estas granda sukceso, ke ĝis duono de junio aliĝis pli ol mil kongresanoj kaj inter ili 114 el Ĉeĥio. Kompare kun historio tio ne estas tiom. En Prago en la jaro 1996 estis preskaŭ trioble pli da partoprenantoj. Kaj eĉ tri jarojn post Granda Milito, dum 13-a UK en Prago en la jaro 1921, partoprenis dufoje pli da kongresanoj ol nun. Sed tempoj ŝanĝiĝas. Multe da homoj preferas renkontiĝojn per reto, kiuj estas pli malmultekostaj kaj pli sekuraj. Lastan eŭropan UK en Torino partoprenis 1318 esperantistoj kaj antaŭ naŭ jaroj dum la 101-a UK en Nitra, la plej proksima kongresurbo, venis 1253 aliĝiloj. Ĝis komenco de nia UK restas ankoraŭ monato kaj ĉiuj organizantoj esperas, ke ni atingos similan nombron de aliĝintoj.

Dum konferenco de ĈEA en Prudká, kiam mi prezentis unue eblecon gastigi Universalan Kongreson aŭ en la jaro 2025 aŭ en la jaro 2026, ni babilis pri tio, ke organizi UK-on ne estas tasko nur por komitato de la asocio. Demandu somere partoprenantojn de UK en Brno, ĉu ili konas nomojn de LKKanoj. Nur kelkaj eble konas, ĉiuj aliaj devos rigardi liston de LKKanoj, kiu aperos en Kongresa Libro. Sed ĉiuj partoprenantoj scios, ke Ĉeĥa Esperanto-Asocio estas landa asocio zorganta pri UK. Do sukcesa UK devas esti kaj estas vizitkarto de ĉiu membro de nia Asocio!

Nunjare oktobre okazos en la urbo Havířov Kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Jam nun vi povas aliĝi per reto. Dum la kongreso okazos krom alie elekto de nova komitato kaj ankaŭ diskutado kaj planado kion plu. Lastan elektoperiodon ni plejparte dediĉis al preparo de UK en Brno. Dank‘ al tio estos Esperanto en nia lando certe pli konata. Kiel ne perdi tiun ĉi ŝancon, kiam publiko scias pri ni? Ĉu ni estas pretaj bonvenigi novajn interesatojn pri la movado kaj pri la lingvo? Kion ni povas proponi al ili nehavante sufiĉe da instruistoj de la lingvo kaj programojn por plialtigi konojn pri la movado?

Certe en Havířov ni diskutos, ĉu la UK en Brno estis aŭ ne estis sukcesa. Sed pli riĉan diskutadon mi atendas je temo de estonteco. Do venu al Havířov por Kongreso de ĈEA kaj kunkreu estontecon de Esperanto movado en nia lando!!!

Mgr. Ing. Jiří Tomeček
Prezidanto de ĈEA

Polyglot Gathering

*Fotoj el la retejo de PG
por amaskomunikiloj*



Koncerto en Bobbyhall, kie okazos ankaŭ kulturaj aranĝoj dum nia UK.



Komuna foto pruvas, ke en la aranĝo estis preskaŭ mil partoprenantoj.



Kongres Českého esperantského svazu 2025

Havířov 17.-19. 10. 2025

Po čtyřech letech se nejvýznamnější akce Českého esperantského svazu (ČES) vrací do Moravskoslezského kraje, nejmladšího města České republiky. Havířov v tomto roce slaví 70 let! Vznikl jako satelitní město ostravské aglomerace pro ubytování havířů a hutníků, kteří v té době do regionu proudili.



Pro své mládí se nemůže chlubit staletými architektonickými památkami, ale na druhou stranu díky plánované stavbě téměř na zelené louce vznikl zajímavý městský komplex. Architektonicky nejcenějším a nejzajímavějším prvkem je jádro města, a jeho blízké okolí, které bylo postaveno v 50. – 60. letech ve stylu *socialistického realismu*. V roce 1992 bylo vyhlášeno chráněnou památkovou zónou a nazváno podle tohoto stylu *SORELA*. Oblast SORELY je velice cenná svým nadčasovým urbanistickým řešením.

Hned při příjezdu vlakem zaujme návštěvníka budova nádraží, která byla postavena podle návrhu architekta Josefa Hrejsemnou a patří v naší zemi k nejvyšší kvalitě dochovaných ukázkám bruselského stylu 60. let minulého století. Budova prochází v poslední době rekonstrukcí, ale řada původních prvků je zachována. Mimo jiné barevná skleně-

ná mozaika o ploše 65 m² sklářského výtvarníka a malíře Vladimíra Kopeckého. Cesta vlakem z Ostravy trvá necelou půlhodinku, z Prahy nebo ze Svitav jsou to tři hodiny. Kromě Českých drah jezdí po této trati i dopravce RegioJet. Havířov má dobré spojení rovněž autobusovou dopravou.



Vlastní kongres ČES se uskuteční na Těrlické přehradě, která je přirozeným rekreačním zázemím Havířova. Ubytovaní, stravování i kongresové místnosti jsou zajištěny v Jaškovské krčmě v Horním Těrlicku.

Budova samotné krčmy postavené ve stylu gotiky a renezanse je zapsána na seznamu kulturních památek. Krčma je jedna z nejstarších doložených hospod v Česku, na Moravě i ve Slezsku. Poprvé byla zmíněna v listině z roku 1268.

K původní krčmě je přistaven moderně zařízený hotel, kde budeme ubytováni.

Více informací najdete na webu esperanto.cz a elektronickou přihlášku na adrese

<https://esperanto.cz/kongresCESHavirov>



Inaŭguro de la ekspozicio "Esperanto en la mondo" en la Esperanto-Muzeo

Sabaton, la 31-an de majo, en la Esperanto-Muzeo en Svitavy okazis la inaŭguro de la nova ekspozicio "Esperanto en la mondo". La ekspozicio prezentas la plej gravajn esperantajn objektojn, nome la Muzeon en Vieno, Svitavy, Jokohamo, Japanio, kaj Ĉinio.

La ekspozicio inkluzivas ankaŭ mond-mapon, kie estas markitaj la urboj, kie okazis mondkongresoj. Estas ankaŭ kronologia superrigardo de ĉiuj kongresoj.



La solena tago inkludis prelegon de Petr Chrdle pri la vivo de Praga naskitino kaj Nobel-premiitino pri paco Berta Suttner. Ĉar estis granda intereso pri tiu ĉi libro, Petr Chrdle publikigis ĝin ankaŭ ĉeĥe. La nova libro estis eĉ "baptita" kaj lanĉita kiel parto de la programo. La baptopatro de la libro estis la direktoro de la Urba Muzeo kaj Galerio, Mgr. Hynek Stříteský, kiu plie konigis al ni la planitan rekonstruon de Domo Ottendorfer. Estas bona novaĵo por ni, ke la

Esperanto-Muzeo ankoraŭ estas planata post la rekonstruo.



Miroslav Sýkora konigis al ni la regulojn por marki turismajn vojojn por piedirantoj, skiantoj, biciklantoj kaj rulseĝaj uzantoj, kiuj estas ĉe la plej alta nivelo en Ĉeĥio. En sia prelego pri la historio de Svitavy, Jan Richtr elektis la plej interesajn lokojn kaj esploris, ĉu niaj granduloj kiel Johano Amoso Komenio povis viziti Svitavy. Esplorante la arkivojn, li ankaŭ malkovris, ke Svitavy estis jam menciita en Esperanta teksto fine de la 19-a jarcento, kaj en 1902 jam okazis Esperanto-kurso, kiun partoprenis 25 personoj, instruita de Er. Kobliške el Lanškroun. En la proksima ĉirkaŭaĵo okazis ankaŭ Esperanto-kursoj.

La klubo faris magnetojn kaj butonojn de la Esperanto-Muzeo. La informcentro disponigis varban materialon pri la Ottendorfer-domo ankaŭ en Esperanto.


Libuše Dvořáková

Polyglot Gathering en Brno

Renkontiĝo de lingvo-amantoj okazis en Brno (28 majo – 02 junio 2025) en la Mendel-universitato, konstruaĵoj Q kaj X, do ĝuste en la samaj spacoj, kie post du monatoj okazos UK 2025. Tio ne estas hazardo, ĉar la organizanta teamo [E@I](#) plejparte identas kun la Kongresa Fakto de UEA. Do la aranĝo estis ankaŭ trejnado por nia UK.

La nombro de partoprenantoj estis simila (950 personoj), la inaŭguro kaj koncertoj okazis en proksima Bobbyhall, kie realiĝos ankaŭ la inaŭguro de UK. Ne mankis libroservo, plejparte esperantolingva, ni povis elprovi la universitatan kantinton, kie ni tagmanĝis, kvin prelegojn kun prelegoj pri diversaj temoj.

La prelegoj kaj koridoraj interparoloj estis plejparte en la angla, kelkaj hispane, germane, france, tamen ankaŭ Esperanto estis aŭdebla.



Koncerto de nevidantaj kantistoj


El ĉefaj esperantistoj partoprenis Marek Blahuš, Josef Kalčík, Milan Kolka, Miroslav Malovec, el la slovakaj Pavol Petřík, Peter Holba (libroservo), Martin Valo kaj Peter Baláž kun sia teamo. Venis ankaŭ s-ro Bernard Tuidar el la viena Esperanto-muzeo kaj Chuck Smith, fondinto de Vikipedioj esperantolingva kaj ĉeĥa (kun Malovec) kaj de E-kursoj ĉe Duolingo.

La prelegoj temis ekz. pri riĉa afrika lingvo, pri vivo de poliglota adoleskanto, pri la homaj lingvaj rajtoj, kial lingvolernantoj estas pli bonaj ol artefarita intelekto, pri arto de memorado, pri TEJO, pri instruado per bildoj ks. Interesa estis instruado de Esperanto per refrena metodo – la lernantoj devas plurfoje kanti iun frazon kiel refrenon en kanto (ekz. *mia nomo estas Paŭlo, mia nomo estas Paŭlo, mia nomo estas Paŭlo*).

Du monatojn antaŭ la renkontiĝo estis proklamita konkurso: kiu kapablos dum 50 tagoj ellerni fundamentojn de Esperanto aŭ de la ĉeĥa? Por la ĉeĥa aliĝis 6 personoj, por Esperanto nur unu, kaj rezultoj estis surprize bonaj. En la ĉeĥa ĵurio estis meksika junulo, kiu parolis ĉeĥe tre bone – li ellernis la ĉeĥan dum du jaroj per aŭskultado de videoj en Jutubo.



Ses personoj (dekstre) lernis ĉeĥe dum 50 tagoj



Hispane prelegas poliglota adoleskanto

Kongreso de IFEF en Žilina

30. 4. – 4. 5. 2025 okazis 77-a kongreso de esperantistoj-fervojistoj. Nunjare ni vizitis urbon Žilina (SK), kiu estas grava fervoja nodo kaj sidloko de estinta Trafika Altlernejo, nun Universitato Žilina.

Nia kongresejo estis en hotelo Galileo, kie ni trovis ĉion, kion ni bezonis. Pri la kongreso zorgis spertaj organizantoj M. Feifíčová kaj P. Baláž kun teamo E@I.

Komence de la kongreso okazis solena malfermo de fotoekspozicio en Urba libropruntejo „La plej belaj fervojlinioj en Slovakio kaj Pollando“. Poste jam komenciĝis kutima programo konsistanta el fakaj kaj nefakaj prelegoj, kunvenoj kaj kultura programo.

Ne mankis plenkunsido por pritrakti internajn aferojn, inkluzive elekton de estraro IFEF. Post la baloto estis elektita A. Švubová por posteno de prezidantino, kiu anstataŭis sukcesan prezidantecon de sinjorino R. Todor. Aliaj elektitaj estis V. Tornillo, L. Vignaud, L. Kovář, do IFEF estas preparita por sekva laboro.

Dum la kongreso okazis ankaŭ ekskursoj al kastelo Budatín, piedirado al monto Dubeň, vizito de urbo kaj pitoreska vilaĝo Čičmany. Tuttaga ekskurso gvidis interesiĝantojn al etŝpura elektra fervojo TREŽ, kiu kunligas Trenčianská Teplá kun banloko Trenčianské Teplice. Post la vizito sekvis veturado al urbo Bratislava por viziti trafikan muzeon.

La kongreson vizitis pli ol 90 partoprenantoj.

Ni tre dankas al LKK.

Venonta nia kongreso okazos en Serbio, en Beograd kaj Mokra Gora.

Ladislav Hakl

Aŭstria kongreso en Graz

9. 5. – 11. 5. 2025 la stiria urbo Graz gastigis partoprenantojn de Aŭstria Esperanto-Kongreso, unuan post multaj jardekoj. El Ĉeĥio ĉeestis Jirka kaj Mirka Tomeček kun muzikgrupo Šafrda, kiu koncertis vendrede vespere, Petr Chrdle, kiu prelegis pri Bertha von Suttner, Milan Kolka kaj Miroslav Malovec.

Mireille Grosjean reprezentis ILEI.

La kongreso okazis en Volkshaus (popola domo), en kiu troviĝas ankaŭ klubejo de lokaj esperantistoj. La domo fakte apartenas al komunista partio kaj la komunista urbestro venis persone la kongreson saluti.



La aranĝo konsistis el prelegoj, ekz. kulturaj diferencoj inter Eŭropo kaj Azio, kiel reprezentantoj de UEA laboras ĉe Unuiĝintaj Nacioj, gravaj sciencistoj de Graz kaj Stirio, Bertha von Suttner, kiel efike diskonigi Esperanton, ĝemelaj urboj, la vera genio Spomenka Štimec, komparo inter planlingvoj Esperanto kaj Rumantsch Grischun, „La eta princo“ en diverslingvaj tradukoj, vestolavado kaj necesejoj tra la mondo.

La kongreson aranĝis kaj energie reĝisoris la prezidanto de la Aŭstria Esperanto-Federacio Ewald Schick.

-mm-

Nova E-mentalano Wojtek

Regulan merkredan E-mentalano kunvenon partoprenis Wojtek el Pollando. Post sia forveturo li skribis mallongan artikoleon pri la kunveno.

Ne estis facile forlasi urbon de E-mental'. Mi planis resti en Prago kiel kutime du noktojn/unu plenan tagon. – La renkontiĝo okazas merkrede, vi nepre restu en Prago ĝis tiam! – diris la Diktatorino. Mi estis senhelpa. Nu, verdire mi delonge ja volis sperti kunvenon de tiu legenda Esperanto-klubo, do mi ne rezistis forte. La renkontiĝo okazis en loka centro de universo – kuirejo de la diktatorino Vlasta. Venis ankaŭ ministrino de katastrofoj kaj ministro de vetero. Dum renkontiĝo ni aŭskultis prelegon de unu el E-mentalanoj pri ŝia vojaĝo al Svedio kaj kvizon pri tiu lando. Nu, praktike ĉiuj kune prelegis kaj gvidis la kvizon, aldonante ŝercojn kaj amuzaĵojn. Mi delonge ne ridis tiom multe!

Poste venis tempo por torto, ĉar du klubanoj festis naskiĝtagon. Ĝi estis manĝita en tradicia E-mentala maniero – ĉiuj sencere manĝis ĝin per kuleroj rekte de komuna plado. Ĉu la etoson plibonigis bona kvanto de Moravia blanka vino? Mi ne diras ke ne..

E-mental' ŝajnas al mi modela Esperanto-klubo. Praganoj eble ne havas ambiciojn konkeri la mondon (aŭ bone kaŝas ilin), sed kreas belegan komunumon de proksimaj al si homoj, kiuj sincere zorgas unu pri alia, kunlaboras kaj – kiel skribitas sur iliaj klubaj t-ĉemizoj – ĝuas la vivon en Esperanto.

Dankegon pro gastigemo karaj, restu mojosaj kaj ĝis la sekva!

Ĉar dum la kunveno evidentiĝis, ke Wojtek estas sufiĉe E-mentala, estis decidite, ke li fariĝos Ambasadoro por Pollando.



Gratulon al la nova membro! Tuta registaro ĝojas pro la decido de la nova ambasadoro dediĉi reston de sia vivo al la bonfarto de E-mental'.



Wojtek antaŭ kelke da tagoj komencis grandan (petvetur)vojaĝon tra la mondo. E-mentalanoj deziras al li bonan vojaĝon kaj multe da eminentaj travivaĵoj! Kaj ankaŭ ili ĝojatendas lian revenon, por ke li plenumu siajn E-mentalan devon.

Esperanto facila

En la retejo <https://uea.facila.org> oni povas trovi interesajn tekstojn en facila Esperanto. El la aktuala propono ni elektas fragmentojn:

Kial Burno?

Eblas diri *Brno*-anoj, sed ne *Brnanoj*, *Brna*, ĉar silabo **br** ne ekzistas en la fonetika sistemo de Esperanto. Estus konvene, ke ekzistu Esperanta nomo, ĉar ankaŭ aliaj lingvoj ĝin havas: en la germana *Brünn*, en la latina *Bruna*, en la jida *Brin*, en la albana *Bërno*. La akademianoj konsideris formojn kun aliaj vokaloj, ekz. *Barno*, *Berno*, *Birno*, *Borno* kaj *Burno*. *Berno* estas svisa urbo, Bruno persona nomo kaj koloro, tial finfine la rekomendo de la Akademio estis *Burno*.

Biciklu al Burno por la Universala Kongreso

BEMI ([Biciklista Esperantista Movado Internacia](#)) proponas kunordigi la dezirojn de biciklemuloj. Ni celas, ke okazu unu aŭ du karavanoj al Burno - aŭ eble eĉ pli?

Jam atingis nin du proponoj kun proksimume jenaj detaloj:

- Biciklado de Vieno al Burno: 150-175 km, en 3 tagoj;
- Biciklado de Prago al Burno: 250-280 km, en 6 tagoj.

Baldaŭ aperos pli da detaloj en nia retejo bemi.tejo.org en la sekcio "Karavanoj".

Esperantistino premiita en Burundo

Anny Joance Nizigiyimana, 26-jara burunda esperantistino, ricevis premion de la prezidanto de Burundo, Evariste Ndayishimiye, dum la festado de la Internacia Virina Tago.

Afrikanoj antaŭ la interreto

Antaŭ la interreto, antaŭ la telefonoj kaj ekranoj, la afrikaj vilaĝoj estis riĉaj je aliaj formoj de komunikado kaj interŝanĝo de scioj. En tiuj tagoj, sciado kaj saĝeco pasis de generacio al generacio per la voĉo de la plej aĝaj, kies memoroj estis kiel vivantaj libroj.

Ĉiunokte, kiam la suno foriris kaj la nokto sin kovris per brilantaj steloj, la vilaĝanoj kunvenis ĉirkaŭ fajro. Tie, ĉirkaŭ la fajro, la saĝuloj malfermis la trezorojn de la pasinteco. Ili rakontis pri la kreado de la mondo, pri la unuaj plantoj kaj bestoj, pri la unua viro kiu lernis kiel forĝi feron, kaj pri la virino kiu malkovris la magion de kurac-herboj. Rakonte kaj kante, la saĝuloj instruis pri la mondo, pri amikeco, honoro, kaj kuraĝo.

Kiel plej efike lerni Esperanton

Respondo estas simpla: iru al Esperanto-renkontiĝo aŭ simila evento!

Multaj specoj de eventoj ekzistas. Unue, estas la **lokaj eventoj**. Ili ĝenerale okazas regule, ekzemple ĉiumonate. Due, **kursoj kun instruistoj**. Trie, estas **naciaj renkontiĝoj**, kiuj kutime okazas ĉiujare. Kaj kvare, estas **internaciaj renkontiĝoj**, kiuj foje okazas ĉiujare, foje malpli ofte.

La plej granda renkontiĝo de Esperanto-parolantoj estas la **Universala Kongreso** (UK). Fine de julio 2025, ĝi okazos en Burno, Ĉeĥio.

La plej granda renkontiĝo por junaj esperantistoj estas la **Internacia Junulara Kongreso** (IJK). En 2025, ĝi okazos en aŭgusto en Cisarua, Indonezio.

Kion faras la komitato

La 24-an de majo 2025 la asocia komitato kunvenis en la fervojista klubejo de la stacidomo Choceň por kontroli, kiel estas preparitaj UK Brno kaj ĈEA-kongreso en Havířov. La koncernaj dokumentoj estis projekciataj sur la muro.



Antaŭ tiu ĉi ĉeesta kunveno okazis multaj retaj, ne nur asociaj, sed ankaŭ de LKK. Ĉi-jare jam 6 kunvenoj asociaj kaj 17 kunvenoj de LKK por UK.

La asociaj okupiĝis pri la asocia budĝeto, pri libroservo post transiro de KAVA-PECH al Kanado, pri konservado de asociaj dokumentoj en elektronika formo kaj ĉefe pri preparo de la asocia kongreso en Havířov.

La LKK-anoj pritraktis naciajn vesperon, urban subvencion, ekskursojn, invitojn de gravaj personoj al honora komitato de la kongreso, trejnadon de volontuloj, programon en stelobservejo, infanan kongreseton, preparon de la dua bulteno kaj de la kongresa libro, elektadon de nomoj por la kongresaj prelegejoj, eblojn de reklamoj en Brno kaj similajn aferojn, kiuj tamen gravas por la flua okazigo de la kongreso.

Trejnado de helpantoj

De la 27-a ĝis la 29-a de junio 2025 okazos la antaŭkongresa **renkontiĝo de helpantoj** en Brno, por ke ili ekkonu la lokon kaj siajn taskojn dum UK. La helpantojn gvidas LKK-anino Vlasta Piščíková. Helpanto pagas plenan kotizon kaj nur post la kongreso ricevas reen parton aŭ tuton de sia mono laŭ farita laboro.

Unutaga vizito de UK 2025 Brno

Por la tuta kongreso pagas nun membro de UEA el B-lando kotizon 215 EUR, nemembro 270 EUR. Sed ekzistas ankaŭ unutaga kotizo por UK, ĝi kostas 60 EUR por membroj de UEA kaj 100 EUR por nemembroj, aĉetebla maksimume por 2 sinsekvaj tagoj de UK.

Se vi elektas unutagan kotizon bv. plenigi la aliĝilon kaj indiki la dato(j)n en la komento, poste ni povos korekti la pagendan sumon.

Havířov – volební sjezd

Sjezd v Havířově bude volební, což znamená, že budeme muset zvolit nový Výbor svazu. Případné návrhy na složení Výboru zasílejte předsedkyni volební komise Radmile Švejcarové na adresu:

radmilasvejcarova@gmail.com

Podle Stanov může mít Výbor 3 až 9 členů, v současnosti má 6 členů. Počet členů volí členská schůze.

E-mental' en Berlino

Dum la semajnfino 14. – 16. 3. 2025 membroj de la klubo E-mental' vizitis la germanan ĉefurbon Berlinon. Ilia plano estis ekkoni la urbon kaj precipe renkontiĝi kun lokaj esperantistoj. Kvankam la planado de la ekskurso estis iom malfacila, fine la semajnfino estis por ĉiuj partoprenantoj tre bela, interesa kaj ĝojiga.



Al Berlino la grupo venis per rekta buso el Prago. Jam en la busstacidomo atendis ilin unu esperantistino, kiu akompanis ĉiujn al la hostelo, kie E-mentalanoj havis menditan loĝigon. La hostelo estis bone atingebla per urba trafiko kaj oni sufiĉe rapide povis veni tien.

Post rapida enloĝigado ĉiuj kune iris al nemalproksima restoracio por vespermanĝi kune kun pluaj esperantistoj. La restoracio estis en la stilo de Orienta Germanio kaj ĉiuj dekoraciaĵoj estis en la stilo de tiu tempo. Same la manĝaĵoj kaj bedaŭrinde ankaŭ la tempo, dum kiu oni devis atendi, ĝis ĉiuj estos priservitaj. Sed danke al babilado kun la lokuloj ne estis la atendado tiom neeltenebla, do kiam ĉiuj finfine ricevis sufiĉe bongustan manĝaĵon, ĉiuj kontentis.

Sabate post matenmanĝo, kiun E-mentalanoj preparis en hostela kuirejeto,

ĉiuj ekis al la centro de la urbo por kunveni kun lokuloj, kiuj promesis duhoran ĉiĉeronadon tra interesaj lokoj. Kvankam estis pluvema kaj ne tro varma vetero, ĉiuj ĝuis kaj la promenon kaj rakontadon.

Tagmeze, kiam la vetero pliboniĝis kaj eĉ aperis suno, estis kunveno kun pluaj esperantistoj en Esperanto-klubejo kaj de tie oni iris al proksima monteto, kie oni faris komunan foton, tostis je german-ĉeĥa amikeco kaj precipe oni tie anstataŭ tagmanĝo piknikis.

Post plua promenado ĉiuj ĝojis, kiam oni povis sidiĝi en kafejo en la centro de la urbo kaj iom ripozi. Poste oni vizitis restaĵojn de la berlina muro kaj ĉiuj jam ĝojatendis vespermanĝon en barata restoracio.



Post la vespermanĝo nur kelkaj E-mentalanoj estis sufiĉe fortaj por reveni al la hostelo perpiede, kiu estis sufiĉe for de la restoracio. Aliaj uzis prefere urban trafikon.

Post dimanĉa samstila matenmanĝo ĉiuj E-mentalanoj estis gvidataj de la hostelo al East Side Gallery por vidi pluajn restaĵojn de la berlina muro, kiuj

en tiu ĉi loko estas pentritaj de diversaj artistoj.



De la muro parto de la grupo ekis perpiede al la centro de Berlino kaj parto uzis urban trafikon por atingi Alexanderplatz. Tie la pigruloj atendis pli diligentajn E-mentalanojn en kafejo kaj poste ĉiuj kune plu promenis tra la centro.

Tagmanĝon meritis ĉiuj kaj do oni kune manĝis en antaŭmendita meksikia restoracio. Poste jam forveturo al ĉefstacidomo, kie E-mentalanoj adiaŭgis kun la lokuloj, kiuj akompanis ilin. Trajno venis ĝustatempe kaj E-mentalanoj envagoniĝis. Dum la vojaĝo reen al Prago ĉiuj parolis pri la travivita semajnfino, pri la vidinda urbo kaj precipe pri belaj momentoj kun novaj amikoj. Ili ĉiuj nun estas atendataj en Prago por kune travivi pluajn komunajn momentojn!

*Merkrede la 18-an de junio 2025 E-mental havis aranĝon **HELPU HELPI**, alivorte **BRIKO**, temas pri karitataj brikoj.*

Marcipana Pasko en Esperanto-Muzeo

Jam la 3-a Marcipana Pasko okazis en mezo de aprilo en Esperanto-Muzeo en Svitavy. Kiel ĉiam sub gvido de Anjo Vyšínková infanoj modlis leporidojn, kokidojn kaj anasidojn. Ĉi-foje la plej granda intereso estis pri leporo. Sume modlis 42 infanoj. Iu infano kreis nur unu figuron, aliaj infanoj ĉiujn figurojn. Ĉiu infano ricevis memor-diplomon.



Aliaj aranĝoj realiĝis en Urba Muzeo kaj Galerio, kie eblis aĉeti marcipanaĵojn el Vracov. La aranĝo ankoraŭ ne havas en la urbo tradicion, tial ne venis tiom multaj vizitantoj kiel dum Marcipana Kristnasko.

Libuše Dvořáková

Akademické prohlášení



AKADEMIO DE ESPERANTO

Dne 13. února 2025 vydala Akademio de Esperanto prohlášení, podle kterého přídatná jména odvozená od sloves značících změnu stavu nemohou označovat výsledný stav, přestože se tak běžně používají. Např. **morta** (*morta fiŝo* mrtvá ryba), **korekta** (*korekta esprimo* správný výraz), **komplika** (*komplika situacio* komplikovaná situace), **malferma** (*malferma letero* otevřený dopis).

Správně by mělo být: **mortinta fiŝo**, **korektita esprimo**, **komplikita situacio**, **malfermita letero**.

Jedná se pouze o doporučení, protože akademio nemá politickou moc něco zakázat, takže není jisté, zda překoná stoleté zvyklosti. **Morta lingvo** (mrtvý jazyk), **morta naturo** (zátiší), **morta zono** (mrtvá zóna) se těžko dají nahradit slovem **mortinta**.

V jazyku je často zvyklost silnější než gramatika. Také **dank' al** je mluvnický nesprávný (apostrofování nemůže nahrazovat koncovku příslovce z výrazu **danke al**), stejně i **sidiĝi** (samovolně usednout), ale Zamenhof ve svých **Lingvaj Respondoj** odpovídá: *anstataŭ "sidiĝu" estus pli bone diri "sidigu vin" aŭ "eksidu" tamen ĉar la formo "sidiĝu" jam de tre longe estas uzata preskaŭ de ĉiuj Esperantistoj, tial ĝi fariĝis jam "esperantismo" kaj nomi ĝin eraro oni jam ne povas.*

-mm-

Naše vidy v esperantu

Naše nedokonavá slovesa často vyjadřují pouze snahu něco vykonat. **Včera jsem chytal ryby, ale žádnou nechytil.** Nelze přeložit: **Hieraŭ mi kaptis fiŝojn, sed nenium mi kaptis.** Takový překlad by zahraničním esperantistům připadal ne-logický a protismyslný, jako bychom řekli: včera jsem chytil ryby, ale žádnou nechytil. Také složený tvar **hieraŭ mi estis kaptanta fiŝojn** (včera jsem byl chytající ryby) mohou chápat tak, že jsem vytahoval z vody jednu rybu za druhou. Lépe je vyjádřit přímo snahu: **Hieraŭ mi provis / klopodis kapti fiŝojn.** Včera jsem zkoušel / snažil se chytat ryby.

Přenosné překladače

Na trhu se objevily přenosné překladače velikosti mobilu v ceně 2 až 10 tisíc korun, které dovedou vaši řeč přetlumočit do cizího jazyka a cizincovu odpověď zpátky do vaší mateřštiny. Vybrat si můžete tlačítkem z desítek jazyků. Mnoha lidem to bude stačit, ale určitě bude nemálo těch, kteří se studiu cizích jazyků nevzdají.

Letošní Lančov

28. setkání bývalých táborníků se letos uskuteční ve dnech **8.-10. 8. 2025**. Na programu výlet na zámek v Uherčicích.

Ceny: nocleh 320 Kč (dvě noci), lůžkoviny 75 Kč, 2 snídaně 80 Kč, oběd 135 Kč, páteční večeře 95 Kč, sobotní večeře 135 Kč. Celkem 705 Kč.

Email: let.lancov@seznam.cz

olgalacinova@seznam.cz

Mobil: +420 737 348 878 (Olga Lacinová)
+420 702 453 615

Nia esperantistino sukcesa en televida konkurso

Kiu estas saĝa kaj kuraĝa, eble mem-konscia, tiu povas aliĝi al iu televida konkurso pri scioj. Estas kelkaj konkursoj, ekzemple Kie hejmo mia?, Ĉasanto, AZ kvizo. En la laste nomita ni povis en mezo de aprilo vidi nian konatulinon, esperantistinon **Milada Zemanová** el Pacov. Foje ŝi jam partoprenis en kelkaj televidaj konkursoj, kaj estis sukcesa. Ankaŭ ĉi foje, en la konkurso AZ kvizo, ŝi bone respondis kaj sukcesis partopreni en 4 partoj de la konkurso. Nome de la esperantistoj mi sincere gratulas al ŝi.



Kiam la kondukanto de la konkurso demandas la konkurs-ĉeestantojn pri iliaj hobiaj, Milada, inter aliaj, ĉiam nomadas Esperanton. Estas bone, ke la publiko aŭdu mencion pri la lingvo.

Ni deziras al Milada, ke ŝi estu daŭre sukcesa kaj ĝoja en la vivo!

L. Chaloupková

Václav Lamr en Parlamentejo




En la tagoj 14 – 25 aprilo 2025 en la Atrio de Parlamentejo estis instalita ekspozicio de Václav Lamr (1943-2020), pentristo, poeto kaj esperantisto, kiu per sia kreado esprimis amon al Dio.

La inaŭguron riĉigis Michaela Skotáková Záhorská (gitaro kaj kanto) kaj Petra Macáková (danco). Aŭspicion akceptis parlamentano Hayato Josef Okamura. Ĉeestis ankaŭ esperantistoj Leonarda Chaloupková, Vlasta Stará kaj Petr Chrdle.

Ĉapitroj el romaa historio

Oldřich Arnošt Fischer esperantigis kaj eldonis libron de Jana Horváthová pri la historio de la romaoj nianlande. Jana Horváthová estas direktorino de Muzeo de Romaa Kulturo, celo de unu el la kongresaj ekskursoj, jam nun disvendita. La leganto povas ekkoni la historion de nia minoritato, kiu vivas kun ni dum jarcentoj, ofte kruele persekutata. Prezo: 170 Kč + 100 Kč sendokostoj per Zásilkovna. Mendu ĉe:



www.esperantobrna.cz/index.php/cz/obc_hudek

Čmufík – Šnufido

Malgranda familia firmao en Prago kun pedagogia, arkeologia kaj lingvistika fono produktas instruajn tabloludojn por infanoj, ne nur ĉeĥe, sed ankaŭ Esperante. Artefarita besto Čmufík – Šnufido estas kvazaŭ talismano.

www.cmufik.cz

TYCHO BRAHE @ JOHANNES KEPLER @ RUDOLF-EPOKA PRAGO

En Eŭropo estas kelkaj lokoj, kiuj povas kun fiero memori jenajn famajn nomojn. Prago estas unu el ili. Kaj precipe la „Prago Rudolfa“... La nocio fariĝis historia kaj arta simbolo por la epoko, kiam amase disvolviĝis la arkitektura stilo, konata kiel „baroka“. Ĝi devenis el Italujo kaj en nian landon transprenis ĝin la majstroj, kiuj estis al ni bonvenige alvenintaj. De tiam nia ĉefurbo estas fama kiel „urbo baroka“; kaj se ne la stilo famigis Pragon, do certe kaj sendube tion faris la imperiestro RUDOLFO la Dua. Jes, li estis tiu ekstravaganculo, la Habsburgo, kiu por sia tronejo elektis ne tradician Vienon, sed la nefaman Pragon. Kaj de tiama tempo havas la urbo epiteton „Prago Rudolf-epoka“ (Prague Rudolphinae). Li invitadis la plej famajn personulojn de Eŭropo; arkitektojn, belartistojn, skulptistojn kaj sciencistojn. Estas konate, ke pli ol sciencaj fakoj tio estis pseŭdosciencoj – inter ili la astrologio, kiu lin allogis, al kiu li kredis kaj estis ties konfesanto. Sed tio neniel malfamigas kaj Rudolfon kaj Pragon.

TYCHO BRAHE (ne „de“) estis por Rudolfo la astronomo, kiun li volis havi ĉe sia korto. Ne pro lia renomo kiel astronomo – sed kiel astrologo. Tio klarigas multon pri la kontakto inter ili... T.B. naskiĝis je la 14a de decembro 1546 en suda parto de Svedujo – Skane (en Knudstrup), kiu tiam apartenis al Danujo, al danaj gepatroj. Same, kiel tiam ĉiuj astronomoj, li serioze okupiĝis pri astrologio. Sed tamen astronomio lin altiris pli forte kaj lin faris fama tiomgrade, ke la dana reĝo Frederiko la

Dua proponis al li (feŭde) la **insulon Hven**, ke li tie mem-mastrumadu. Brahe konstruigis tie observatorion, kiun li nomis **URANIBORG** (Uranio estas patronino de astronomoj). Kun siaj kunlaborantoj li tie noktojn, jarojn faris observadon de ĉielo kaj amasigis multegajn observaĵojn.

Kiam li perdis favoron de (la nova) reĝo (post eble 20 jaroj) li decidiĝis sian patrolandon forlasi kaj serĉi la okupon en alia(j) loko(j) de Eŭropo. (Li jam havis nombran familion, do...)

Prago estis la lasta. Kaj la escepta...

El niaj lernejjaroj ni rememoras T.B. „kiel la homon kun ora nazo“.

Tion oni povas vidi sur lia tomboŝtono en la preĝejo Týnský chrám. Jes, en sia junec-diboĉa tempo li perdis parton de la nazo en ia kverelo, kaj la tutan vivon li havis oran protezon, kio certe al li kaŭzis multajn komplikaĵojn.

Krom tio li estas al popolo konata pro alia epizodo: je la 13a de oktobro (1601) li partoprenis solenaĵon en la palaco de Rožmberk (Hradčany), kie ĉeestis ankaŭ la imperiestro.

Jes ja, T.B. estis turmentita per la „korpa neceso“, sed li opiniis netaŭga forlasi la manĝotablon en la ĉeesto de la reĝo. Do, li „eltenis tion“, sed (eble) okazis akuta uremio kaj li mortis jam en la 24a de la sama monato. En sia neplena 56-jariĝo. Li estis entombigita en Týnský chrám. La kortuŝan funebro-parolon havis d-ro Jan Jessenius. Kiam li estis rektoro de la universitato en Wittenberg, Tycho kun sia familio loĝis en lia domo.

La ĉefaj meritoj de Tycho Brahe en astronomio estas jenaj:

- li, kiel la unua – antaŭ Galileo-teleskopo – uzis sian aparaton, (ankoraŭ ne kun optiko) t.n. „astronomian lornon“

- li faris sukcesajn klopodojn por organizado de science grava laboro.

Jes, la informoj, la mezuroj amasiĝis en liaj manoj – sed ne la rezultoj, kiuj progresigus la fakon. Li tion ne kapablis (ne estis matematikisto) – eble eĉ pri tio ne strebis. „Nur“ li havis bonan instinkton: por la kunlaboro inviti la junan scienciston – JOHANNES KEPLER. Kaj kiam en Prago renkontiĝis jenaj „du planedoj“, okazis progreso.

Estis konstruita la sistemo, la malkovro de la astronomiaj leĝoj, laŭ kiuj funkcias la kosmo (la universo). Tiu konstruisto, tiu „arkitekto“ estis la matematikisto, kiu jam en sia 26a aĝo havis altan renomon en la regionoj de la germana lingvo. La imperiestro Rudolfo ne hezitis lin inviti (je instigo de T.B.!).

Problemo(j) de astronomio

La granda, grava demando ekzistis „de kiam ekzistas homaro“.

Kiel funkcias la kosmo ?.

En la etapo, en kiu vivis niaj menciitaj astronomoj, por la mondo tiu problemoj jam „ne staris“ de tiam, kiam la demandon („por ĉiam“) respondis la greka astronomo PTOLEMAIO (85 – 166).

La kosmo funkcias, ĉar ĝia koro estas nia planedo TERO, kiu ne moviĝas. La Teron ĉirkaŭmoviĝas aliaj planedoj. Ankaŭ Suno. Tion certigis ankaŭ la sankta libro – Biblio, de kiam homoj fariĝis alfabet-kapablaj, sciiis legi kaj skribi.

Poste „falas bombo“! Ne el ĉielo (kvan- kam la hezitantaj tion meritis), sed en la

formo de nova kosmo-teorio, kiun proklamis (ne tuj tre kuraĝe) la pola kanoniko Nikolao KOPERNIKO (1475 – 1543): **la kerno de la kosmo ne estas nia planedo, sed SUNO!!** Tion la mondo ne povis akcepti! Precipe ne religiaj rondoj, kiuj la teorion eĉ malpermesis (kiel kontraŭ-biblia). (La plej „ortodoksaj“ kontraŭstarantoj estis jezuitoj; ankaŭ en Prago).

Kaj kion Tycho Brahe? Jes, la teorio surprize trafis ankaŭ lian koron. Kvan- kam li tre estimis Koperniko-n, li ne povis plene kongruiĝi kun li, malgraŭ ke li tre honeste la aferon pricerbumis, strebante kompreni. Poste li restis je sia mem-elpensita konstruo, je sia „pli taŭga“ kosmo-sistemo. Sed la astronomio favore antaŭeniris nerigardante hezitulojn, sed avide akceptante progres- emulojn.

Kia estis JOHANNES KEPLER. Li tre „avide“ kaptis la proponon de T.B. labori komune en Prago. Havi la nemezureblajn observaĵojn de Tycho (li pensis pri el- dono de 24 volumoj, kiam Tycho mortis!). La observaĵojn li opiniis „sia plej rara valorajo“, sur kies bazo li mem po- vas progresi. Li komencis tie, kie Brahe sian laboron finis.

- Brahe proklamadis, ke planedoj *ne moviĝas sur kompaktaĵ sferoj...*

Kepler pruvis, ke planedoj *moviĝas en - aeraj sferoj...*

- Brahe, kiu okupiĝis pri la planedo Marso (al ni plej proksima) malkovris. Ke lia orbito-movo **ne estas cirkla ...**

Kepler malkovris, ke ĝi estas nek cirkla nek ovala, **sed elipsoforma...**

Ankaŭ Kepler kontinuigis sian laboron ĉe la Marso, ĉar lia genia intuicio diris al li: se la fenomenoj ekzistas ĉe tiu planedo – do kial ne ĉe ĉiuj planedoj?!

*„Mi multe okupiĝis per esplorado de fizikaj kialoj. Mi volas montri, ke la ĉiela mekaniko ne estas simila al la viva kreaĵo. Sed similas al la horloĝa mekanikaĵo. Tiel ja preskaŭ ĉiuj diversaj movoj estas kaŭzitaj de la universala magneta forto – tute simpla – kaj tiamaniere kiel la horloĝa mekaniko moviĝas per pezilo. (Rim. Ĝis tiam oni kredis, ke steloj troviĝas sur kompaktaĵ sferoj. M.T.). Mi nur demonstras, kiel planedoj moviĝas en senkompaktaĵ sferoj. **Kaj ke la „pezilo“ de nia planedo Tero – estas la SUNO. La orbito estas elipsa.“***

Elipso - kia „magia“ vorto...

En Prago ni jenan (elipsoidan) formon renkontas „je ĉiu paŝo“. Kiel jam estis dirite, ĝi estis la favorata arkitektura formo de tia epoko.

Elkreskas jena demando: kie en tiu baroka „torento“ vivis niaj du protagonistoj? Kie ni ilin povus renkonti (nia image)?

Jen: se ni eliras el la grandioza burĝa arealo Hradčany direkte al Pohořelec (tram-vojo), ni staras „facon en faco“ al la monumenta skulptaĵo de du kunstarantaj figuroj: tio estas Tycho Brahe kaj Johannes Kepler. Ĝi staras sur parcelo de la nuna *Gimnazio de Johannes Kepler*. En la tempoj, pri kiu parolas nia eseo, staris ĉi tie larĝvasta domo de la Rudolfa kortegano Curcius (Curcio, Kurcius).

Ni klarigu, ke tiu gravulo, estinte ambasadoro en eksterlando(j), renkontiĝis tie kun la famo de Tycho Brahe, kaj instigis Rudolfo-n por inviti la astronomon veni en Pragon.

Kiam li en la eksterlando post nelonge mortis, la imperiestro aĉetis la domon de la vidvino (je 10 000 guldenoj) por ke tie

loĝu T.B. kun sia familio (li havis 5 infanojn). Brahe tre plendis, ke lian notan observadon ĝenas vesperaj ceremonioj (kaj sonoriloj) de monaĥoj el apuda kapucena monaĥejo. La Imperiestro proponis al Brahe elekti el tri kasteloj, kiuj troviĝas proksime de Prago. Brahe elektis la kastelon en Benátky nad Jizerou (tiam Nové Benátky). Tie povis vivi Brahe kun la familio kaj kun siaj kunlaborantoj, kiuj alvenadis popaŝe de diversaj landoj. Inter ili ankaŭ J. Kepler. Plej grave, ke tie estis 13 ĉambroj kaj en kelkaj troviĝis astronomiaj aparatoj. Tiuj estis tre valoraj proprecoj de B. Ili estis grandaj objektoj, kiujn oni transportis per river-ŝipoj kaj poste per vehikloj, kiuj estis tiritaj de virbovoj.

Kiel la observejo meritas esti nomita ankaŭ la pavilono Belveder situanta en la Reĝa ĝardeno (Hradčany), famega pro sia italdevena renesanca ĉarmeco. Ja tie ili havis pli bonan – kaj certe pli belan! – rigardon ol en Benátky-kastelo.

Do, ankaŭ Johannes Kepler jam estis „sur la loko“... Bedaŭrinde, la kunlaboro de la du eminentuloj ne daŭris longe (eble 1,5 j.) pro morto de T.B.

Estu substrekite, kaj ni devas multe honorigi Kepleron, kiu restis en nia lando 12 jarojn, tial ni lin opiniu „nia kuncivitano“.

Krom Prago meritas la mencion ankaŭ aliaj urboj, kiuj estas al li koncernaj: *Weil der Stadt (en kiu li 27.12.1571 naskiĝis), Tübingen, Leonberg, Graz (ĉeĥe Štýrský Hradec), Linz, Ulm, Regensburg (ĉeĥe Řezno) – kie li mortis 15.11. 1630 (kaj estis entombigita, sed lia nekatolika tombo jam ne ekzistas!).*

Lia neforgesebla personeco estas memorigita en tiulokaj muzeoj.

Per humura tono ni rimarkigu, ke la figuroj en la filmoj „La bakista imperiestro“ (Pekařův císař), kaj „La imperiestra bakisto“ (Císařův pekař) estis reale vivantaj personoj sur la imperiestra korto. Jes ja, estis inter ili menciitaj „pseŭdo-sciencistoj“, sed ankaŭ dignaj personoj:

Tadeáš Hájek z Hájku, Jan Jesenius, Křištof Harant, Václav Budovec, Martin Bacháček. Ni ilin menciis jam koncerne de Tycho Brahe, sed oni povas imagi, kion ilia amikeco signifis por Kepler en la jaroj de amara fato, kiujn li travivis en nia lando: en la tagoj de tifo mortis kaj lia unua edzino kaj fileto (la restantajn li forveturigis al Kunštát u Hodonína). Baldaŭ li denove edziĝis, sed la malfeliĉo alvenis el alia flanko: en Vurtembergo estis lia patrino kulpigita sorĉistino, kiu onidire kaŭzas malbonaĵojn kaj malsanojn al siaj najbaroj. La bedaŭrinda virino, kiu ja la tutan vivon okupiĝis pri naturkreskantaj herboj por helpi kontraŭ malsanoj, travivis preskaŭ 4 jarojn en prizonejo. Ĉiujn jarojn strebis la ŝatata filo Johannes pri ŝia senkulpigo kaj liberigo. El la prizono eliris rompita maljunulino, kiu baldaŭ mortis.

Nun ni alternigu la tristan, teruran epokon en nia lando post la ribela elstaro de nekatolika nobelaro kaj ties malvenko en la batalo sur la Blanka monto (Bílá hora) apud Prago (1620). Multaj ekzekutitoj estis la menciitaj amikoj de Kepler. Li vivis en senĉesa angoro kaj timo. Sed ne okazis io malbona. Male – oni povas diri, ke li havis sukcesajn jarojn. De lia alveno al Prago (1601) pasis jam 20 jaroj. Pasis du imperiestroj. Restis la taskoj...

Taskoj kaj rezultoj de Kepler:

Ni rememorigu, kial Brahe kaj Kepler estis invitetaj de Rudolfo la Dua al Prago: por ke ili al la imperiestro ellaboru astronomian tabelaron – kaj precipe lian personan horoskopon. La duan taskon ili plenumis (kaj multofte kun Li traktis). La unuan (ankoraŭ) ne.

Kepler diris, ke „*kiel la kuracisto devas iri al malsanulo, devas ankaŭ en astronomio iri ĉio flanken, se la naturo ne atendite proponas la ĝis nun ne plene esploritan fenomenon.* Tial Kepler forŝovis la tabelaron kaj anstataŭ ĝi li ellaboris sian unuan verkon „Astronomia nova“ kiun li dediĉis al la imperiestro kiel Kristnasko-donacon, en la jaro 1605. En la oficiala posteno de imperiestra matematikisto Kepler progresis, kaj famiĝis ne nur kiel astronomo. Eĉ estis al li proponite esti profesoro en la praga universitato, sed li tion rifuzis (pro sia nekatolika konfeso).

Ĉi tie ni ne povas ne mencii la tragikan okazon de la aŭtodafeo de Giordano Bruno (1600). „De la sinjoro Wacker el Wackenfeld (la imperiestra ambasadoro en Italujo) mi eksciis, kiel estis Bruno en Romo mortbruligita. Oni diras, ke sian faton li eltenis neŝancele. Ĉiujn religiojn li proklamis vanaj. Dion li „pistis“ je cirkloj kaj punktoj“. (Respektame esprimiĝis Kepler – kontraŭe ol Bruno-malamikoj:

„Nun Bruno transformita je fumo povas serĉadi kaj vizitadi siajn senfinajn mondojn“).

En la jaro 1625 Kepler finfine kompletigis la „Astronomian tabelaron“, kiun al honoro de sia kliento li nomis „Tabulae Rudolphinae“.

Li fordonis ĝin en la manojn de la imperiestro Ferdinando la Dua, (kaj ricevis la honorarion de 4 000 guldenoj). Ĉe la korto de tia reĝo la funkcio de matematikisto jam ne estis bezona, do Kepler devis serĉi alian okupon por vivteni la familion. Lin okupis (avide lin akceptis) alia grandulo: **Alberto de Valenŝtajn**. Same, kiel Rudolfo, ankaŭ tiu ĉi suvereno bezonis scii sian vivsorton (supozeblis pozitivan!). Kepler neniel malgravigis horoskopojn: „Kie troviĝus la honesta patrino astronomio, se ne estus ŝia diboĉema filino astrologio“. En lia hereda postrestaĵo troviĝis 800 horoskopoj! Inter ili kelkaj, ne nur unu, por Alberto V. Laŭdire li malkovris la tragedian faton de la grandsinjoro, sed ne sciigis ĝin al tiu. Tial li ellaboris kelkajn horoskopojn „apudajn“ kiujn li sternis antaŭ Valenŝtejn.

Kvankam Pragon famigis precipe la personoj alilandaj, el nia lando tamen devenas kelkaj eminentuloj, kiujn ni rememoru:

Tadeáš Hájek z Hájku

Estis sendube la plej elstara ulo dotita per multaj talentoj: oficiale li estis persona kuracisto de imperiestroj, do medicin-doktoro. Krom tio li interesiĝis pri matematiko, astronomio (astrologio), alĥemio, botaniko... Li „estis hejme“ en la sferoj kulturaj ne nur nialandaj, sed eŭropaj. Tial li estis taŭga ambasadoro de Rudolfo ankaŭ rilate la artaferojn, li instigis Lin por aĉeti artaĵojn, kiujn Li volis havi en sia sidejo.

Li estis konato de multaj edukitaj kolegoj en Eŭropo. Kaj li estis tiu, kiu instigis la Imperiestron alvoki la astronomon Tycho Brahe en Pragon. La domo de la familio Hájek estis kruc-

punkto de korespondado inter eŭropaj eminentuloj. Ni nomu kelkajn personojn, kiujn ni konas el la menciitaj filmoj: John Dee, Edward Kelley – la alĥemiisto, k.a. Ili en siaj landoj estis estimataj kiel eminentuloj en sciencoj.

Jan Jessenius

Estimata rektoro de la universitato en Wittenberg, en la praga universitato li kiel la unua demonstris hom-sekcion. Li estis unu el la 27 homoj, kiuj post la subpremo de rebelio (1621) estis ekzekutitaj. Inter tiaj homoj vivis en Prago **Johannes Kepler**. Se oni deĉifras lian horoskopon (kiun li por si mem faris, 1597 j.), oni ekscias, ke lia vivo estos granda dramo de la homo, al kiu la fato donacos nenion senpene, kiu devos multon oferi, multon perdi – sed ankaŭ multon gajni. Kaj multon riski... Ju pli peza estis lia vivoŝarĝo, des pli senhezite li strebis tion solvi. Nek por momento li deprenis la ŝarĝon plej gravan, kiun li al si taskis: la observadon – esploradon de la universo kaj senĉesan serĉadon de ĝia konstanta ordo-sistemo. Kaj per sia matematik-astronom-intuicio li tion sukcesis. Feliĉe, ke li estis memkonscia, ne timema homo; li pri sia vero ne dubis. Ni ne opiniu arogo kaj blasfemo, sed metaforo jenan eldiron: „*La Dio mem devis atendi ses miljarojn ĝis Lia verko estis komprenita.*“

Je la fino (por „amatoraj astronomiaj legantoj“) ni tie havas la sumigojn, kiun ni en nia epoko opinias „banalaĵo“??, kiun konas ĉiu infano (ĉu vere)? Kaj kiu estas „klara kiel survangofrapo“...

La KOPERNIK-a heredaĵo -

kiun neplene akceptis Tycho Brahe; kaj kompletigis Johannes Kepler.

Pri la cirkulado de ĉielaj sferoj – Nikolao Kopernik

- 1. La centro de ĉiuj ĉielaj astroj ne ekzistas
- 2. La centro de la Tero ne estas la „centro de la Mondo“, sed nur centro de la Luno-orbito
- 3. Ĉiuj planedoj moviĝas ĉirkaŭ la Suno, kiu estas la centro de iliaj orbitoj, kaj tial ankaŭ la centro de la Mondo
- 4. La distanco Tero – Suno estas tre malgranda kompare kun la distanco(j) inter sferoj de steloj
- 5. La movo de la ĉielo, kiun ni observas, estas nur ŝajna; en ĝi reflektiĝas nur la movo de la Tero ĉirkaŭ la Suno
- 6. La movo de la Suno inter la steloj estas same ŝajna kaj ekestas pro la movo de la Tero ĉirkaŭ la Suno.
- 7. Similaj movoj de ĉiuj planedoj sur la ĉielo estas kaŭzitaj pere de kunigo de iliaj propraj movoj (ĉirkaŭ la Suno) kaj de la Tero-movo

Aldono

Ni aldonu, ke Tycho Brahe venis en la landon, en kiu en pasinto la astronomio havis sian seriozan staton. La pragaj reĝaj kortoj, komence de Přemysl la Dua, ebligis ĝian disvolviĝon; ofte per la rekta subteno de la regantoj, kiuj ja favoris la astrologion (sciante, ke iaj astronomiaj mezuroj estas tamen bezonaj). La astronomiajn elementojn ni povas trovi ekzemple sur la Karlo-ponto, same en Staroměstská-turo, ĉar ĝuste Karlo la Kvara estis tiu reĝo, kiu pri la astronomio interesiĝis. Eĉ pli interesa estas la fakto, ke sur la reĝkortoj estis amasigitaj kopioj de la gravaj tiefakaj manuskriptoj, kiuj troviĝis en Eŭropo. Ili estas deponitaj en niaj ŝtataj, religiaj, akademiaj muzeoj, apud la raraj observo-aparatoj, kiujn tuŝis la manoj de la nomitaj (ankaŭ nenomitaj) eminentuloj. Ni sentu dankon!

M. Turková aprilo 2025

NOVA LIBRO PRI ESPERANTISTO

En Starto 4/2023, p. 124, mi informis pri ekspozicio en Tajvano dediĉita al ĉeĥa vojaĝisto Bohumil Pospíšil (1902-1974), kiu estis esperantisto. Nun en la jaro 2025 la eldonejo Euromedia Group eldonis libron:

Martin Nekola a kolektiv: Český Marco Polo Bohumil Pospíšil. La libro havas 293 paĝojn kaj tuj sur la paĝo 16 troviĝas lia legitimilo de UEA subskribita de Edmond Privat.

Kun sia unua kunvojaĝanto **Josef Hübl** li vojaĝis al proksima oriento kaj al oriento li restis fidela ankaŭ dum siaj postaj vojaĝoj. La libro estas plena de fotoj el la vojaĝoj, interesa estas ankaŭ ĉapitro kun biografio de **Zdeněk Burian**, kiu ilustris librojn de ĉeĥaj vojaĝistoj kaj rakontojn de Pospíšil en la gazeto *Malý čtenář* (Eta leganto).

Vinilkosmo informas

pri muziko en Esperantujo (enkrampe muzikistoj).

Baldaŭ aperos **Muskola belulino** (La Mondanoj), **Hereditoj** (BaRok-Projekto), **Amo protektas nin** (Kris Fredi el Kongo), **La nova ĝardeno** (Vojaĝo), **Plu esperantumos en 2025** (Kaj Tiel Plu), **JomO popumas** (JomO).

Somere de la 17-a ĝis la 24-a de aŭgusto okazos en la franca Moissac muzika renkontiĝo organizata de la franca E-junularo. Koncertos Platano, Vojaĝo, JoMo, Gijom, Kaj Tiel Plu, Tifen kaj Melono.

vinilkosmo@esperanto.org



Kluba vivo


Prostějov: La 13-an de aprilo 2025 tri niaj membroj vizitis Paskan renkontiĝon en Esperanto-muzeo en Svitavy kaj alportis pli ol 100 esperantlingvaj libroj por nia biblioteko.



Šumperk: El la kluba kunveno la 13-an de marto 2025.



Brno: La kluba prezidanto **Milan Kolka** la 23-an de majo atingis sian **50-jariĝon**.



Al la klubo li venis en la jaro 2012 kaj baldaŭ fariĝis tre aktiva. Li prilaboris vortaron *Gerda malaperis* (2013) por instru-programo de Masa-

ryk-universitato (li laboras ĉe jura fakultato kiel komputilisto). En 2014 li kreis kluban retejon ĉe Facebook kaj en 2015 la klubo laŭ lia iniciato aĉetis propran domajnon. En 2016 li fariĝis kluba vicprezidanto. En 2018 li preparis tabloludon *Abecedino* kaj funkciigis kluban elektronikan butikon. En 2020 dum koronavira fermo de klubejoj li aranĝis virtualajn kunvenojn, registris ilin, metis al Jutubo kaj anoncis ĉe Eventa Servo. En 2021 li fariĝis kluba prezidanto, akiris rajton esperantigi tabloludon *Kodaj Nomoj* kaj organizis solenan 120-jariĝon de la klubo. En 2022 li komencis studi interlingvistikon en Poznań. En 2024 li komencis instrui Esperanton rete (komisiita de la asocio). En la tanzania Aruŝa li transprenis la kongresan flagon kaj en LKK laboras kiel sekretario. Kun Ilona Koutny li preparas multlingvan retan temvortaron helpatan de artefarita intelekto, pri kiu ili prelegos en la UK. Plie li ofte prelegas pri diversaj temoj ne nur en la klubo.

Ostrava-Vítkovice: Tradicia ovofritaĵo



Vizito en Katowice kaj Gliwice

Ĵaŭde la 10-an de aprilo 2025 forveturis tri klubanoj el Brno (O.A. Fischer, M. Kolka, M. Malovec) al Katowice, por reciproki la viziton de klubanoj de regiono Gliwice en Brno antaŭ unu jaro.

Tiam (19.-21.4.2024) venis kvar polaj klubanoj (Zofia Śmistek, Aleksander Zdechlich, Dariusz kaj Ewa Caban). Ni montris al ili akvorezervujojn sub Flava monteto, aktoratan batalon inter nazioj kaj partizanoj pri la burgo Veveří en aprilo 1945, malnovan urbodomon, ĝardenojn de vilaoj Tugendhat kaj Löw-Beer, kafejon de Mendel-muzeo kaj kafejon kun vivantaj katoj. Jen rapida filmo pri ilia vizito en 2024.



En Katowice ni loĝis ĉi-jare en tranoktejo proksime de la fervoja stacidomo.

Vendrede matene venis por ni Ewa kaj Dariusz Caban kaj per aŭtomobilo forveturigis al historia minejo de arĝento.

Unue ni boatis tra koridoro, kies celo estis forkonduki akvon el la minejoj, poste ni ricevis prelegon en la ĉeĥa lingvo (ĉiĉeronino estis el Třinec) pri historio de arĝento-minado en la regiono.



Ŝi venigis nin al lifto, kiu transportis nin en profundon, kie ni ricevis kaskojn. Ili estis vere bezonaj, ĉar marŝante tra malaltaj koridoroj ni multfoje frapis la plafonon per la kapo. Ni vidis, en kiel primitivaj kaj malfacilaj kondiĉoj devis labori ne nur plenkreskuloj, sed ankaŭ infanoj pli ol 10-jaraj. La minado komenciĝis en la 13-a jarcento kaj finiĝis en la jaro 1913.





Sabate ni forveturis trajne al Gliwice, kie atendis nin tri aliaj klubanoj. Ili montris al ni historian radio-stacion, per kiu nazioj la 31-an de aŭgusto 1939 faris provokon, anoncante, ke poloj atakis Germanion, por tiamaniere pravigi propran atakon kontraŭ Pollando la sekvan tagon.



Ni vidis ankaŭ muzeon de statuoj el giso kaj poste multajn gisajn statuojn en la urbo mem. Sur granda urba placo atendis nin tagmanĝo en restoracio, kies specialaĵo estis *kasza* (kaĉo), sed ĝi pli similis al seka gria rizoto. Promenante tra la stratoj ni malrapide revenis al la fervoja stacidomo kaj reveturis al Katowice.

Dimanĉe ni devis forlasi la tranoktejon, tial ni forportis niajn valizojn al loĝejo

de Caban kaj iris promeni tra la urbo kun ĉiĉeronino, kiu atendis nin en parko. Ŝi montris al ni Silezian Parlaŭmenton kaj statuojn de gravuloj, kiuj meritis pri memstariĝo de Pollando post la unua mondmilito.

Ni eksciis, ke la urbo aĝas nur 160 jarojn (antaŭe estis tie nur vilaĝo) kaj havas 160 000 loĝantojn, tamen ilia stacidomo estis grandega kun multaj vendejoj kaj ĉiam plena de homoj.



Post foriro de la ĉiĉeronino ni veturis buse al periferio de la urbo, al iama minista antaŭurbo. Por la ministoj estis konstruitaj pluretaĝaj domoj, simile kiel konstruigis tiajn urbojn la familio Baťa. Nun la minejoj estas elĉerpitaj kaj fermitaj, tamen en la domoj ĉiam vivas homoj kaj la stratoj estas plenaj de turistoj. En unu domo ni vizitis galerion de talentaj ministoj, kiuj amatores pentris. En malgranda kafejo ni prenis trinkaĵojn kaj veturis reen al Katowice.

Ni reprenis niajn valizojn kaj je la 16.20 h ni forveturis al Bohumín, kie ni ŝanĝis trajnon al Brno.

M. Malovec
fotaj O. A. Fischer

AKTUALAĴOJ EL PÍSEK

Sabla Printempo renaskiĝis

Interreta seminario, kiun [EK Písek La Ponto](#) organizis en 2006-2015, post dekjara paŭzo la 4-an de aprilo 2025 denove okazis. Kvankam ĉi-foje nur por unu tago, la ĉeftemo *Esperanta libro-kulturo en la 21-a jarcento* allogis interesiĝantojn ne nur el Suda Bohemio.



Komuna debato komenciĝis en la urba biblioteko. Dum ĝi estis ekspoziciitaj kelkdek Esperanto-libroj troviĝantaj en la fonduso. I.a. oni partumis kialojn de graveco de libroj en nia vivo kaj legis literaturajn specimenojn (ekz. el la verkaro de Ĉ. Vidman). Antaŭ la posttagmeza programo okazis promeno surspure de la poeto [Fráňa Šrámek](#), kiu pasigis en la urbo siajn studjarojn. Sekve la partoprenantoj eklernis pri retfontoj pri Esperanta literaturo (precipe [Literaturo.esperanto.net](#)) kaj elŝuteblaj bitlibroj (aparte rekomendindas la nova portalo [Libro.ee](#)). Estis montritaj ligiloj al elektronikaj bibliotekoj (ekz. en la [muzea retejo](#)) kaj elekto de bitlibroj en la [retejo de EK Brno](#). Aparta pli detala artikolo pri la temo preparatas por [Praga Bulteno](#) n-ro 2. Interesiĝantoj povis trarigardi kaj ev. aĉeti kelkajn novaĵojn de [KAVA-PECH](#).

Vladimír Türk prezentis instrukcian [videon pri kreado de videolibroj](#) kaj

verkojn de Karel Čapek kaj Eduard Petiška spekteblajn en lia jutuba kanalo [Tuurql](#)) kaj en premiero kantis ĉarman tradukon de konata *Píseň pro Kristýnku*, kiu aperis en *Versa neversa mozaiko* de Jan Werner. La projekto nepre planatas esti daŭrigata.

Biblioteko kaj arkivo de EK Písek fonditas

Ekde la 1-a de junio 2025 ĝi havas apartan dignan ejon en la novrenesanca domo el 1887, apartenanta al la urbo, en Karlova str. 108 tutproksime al la Ŝtona ponto.



Ĉiuj elspezoj, pro neprofitcela karaktero sub avantaĝaj kondiĉoj, estos sen-subservencie kovrataj de la geedzoj Pavla kaj Vladimír Dvořák. La ejo estos destinita precipe por stokado kaj prilaboro de la materialoj, studado, realigo de projektoj, individuaj vizitoj (nur laŭ antaŭa interkonsento) kaj ev. ankaŭ pruntoservoj por membroj kaj amikoj de la klubo. Ĝi ne estos destinita por grupaj kunvenoj, lingvokursoj, publikaj ekspozicioj ktp. Nuntempe ekos materia aranĝado kaj la ejo ekfunkcios supozeble ekde aŭtuno 2025.

Pavla Dvořáková

Jubileantoj de aprilo, marto kaj junio 2025

Otilie Barešová, Kolín
MUDr. Josef Čečetka, Mladá Boleslav
Stanislav Droppa, Šumperk
Petr Janeba, Choceň
Milena Jelínková, Jilemnice
Doc. MUDr. Jaroslav Max Kašparů, Rynárec
Ing. Milan Kolka, Brno
Miroslava Kosnarová, Pardubice
Milan Krupička, Volary
Jana Křížková, Lanškroun
Mgr. Dagmar Matějů, Lučice
Stanislava Mikešová, Praha
Stanislav Mudroch, Svitavy
Ing. Jan Rýznar, Lovosice
Vlasta Stará, Benešov
Ing. Mgr. Jiří Tomeček, České Budějovice
Martina Zlatohlávková, Sobětuchy

Karaj jubileantoj, ĝuu la vivon, estu sanaj kaj
kontentaj! Ĝojplenan naskiĝtagon!

Trevor Steele – 85

Unu el la plej grandaj esperantaj verk-
istoj ĝisvivis la 14-an de majo 2025 sian
85-jariĝon. Aŭstraliano, instruisto, li
multe vojaĝis tra Oriento, kie li ĉerpis
inspiron.

Liaj verkoj jam fariĝis
niaj klasikaĵoj: *Sed nur
fragmento* (1987), *Me-
mori kaj forgesi* (1992),
*Apenaŭ papilioj en
Bergen-Belsen* (1994), *Falantaj muroj
kaj aliaj rakontoj* (1997), *Aŭstralia Felix*
(1999), *Neniu ajn papilio* (2000), *La
fotoalbumo* (2001, 2005, 2019), *Divers-
koloro* (2005), *Kaj staros tre alte* (2006
pri Kristo), *Kvazaŭ ĉio dependus de mi*
(2009), *Flugi kun kakatuo* (2010),
Paradizo ŝtelita (2012), *Konvinka*



kamuflaĵo (2014), *Dio ne havas eklezion*
(2015), *Amo inter ruinoj* (2016), *Paulus
fondinto* (2020), *La sangoruĝa flago*
(2020).

Carlo Minnaja – 85

La akademiano Carlo Minnaja naskiĝis
la 19-an de marto
1940. Liaj ĉefverkoj
estas 1438-paĝa *Itala-
Esperanta vortaro*
(1996), *Historio de
Esperanta literaturo*
(2015, kun Giorgio
Silfer) kaj tradukoj *La
Princo* (Machiavelli),
*Raporto pri la unua vojaĝo ĉirkaŭ la
terglobo* (Pigafetta), *La gastejestrino*
(Goldoni), antologioj pri Luigi
Pirandello kaj D'Annunzio.



Fotoj el Vikipedio

Kondolencoj

■ la 20-an de marto 2025 forpasis **Marie
Kostihová** (nask. Vnenková) el Ostrava
(82 j.)

■ la 15-an de majo 2025 mortis
**Gabriela Kopcová-Střelá-
ková**, unu tagon antaŭ sia 80-
jariĝo. Ŝi estis verkistino kaj
pentristino, amikino de Espe-
ranto, ŝiaj Kosmofabeloj aperis en
esperantlingva traduko ĉe KAVA-PECH.



MAX KAŠPARŮ JUBILEAS

Prof. Jaroslav Max Kašparů, profesie psikiatro, pedagogo, publicisto, verkisto kaj greka-katolika pastro, laŭ la „Ĉeĥa libro de rekordoj“ portanto de la plej multaj akademiaj titoloj en Ĉeĥio, naskiĝis la 14-an de majo 1950 en Žirovnice.

Li studis medicinon en la universitatoj en Prago kaj Bratislava (origine stomatologion, sekve ĝeneralan medicinon kun specialiĝo pri psikiatrio). Sekve li studis ankaŭ teologion kaj pedagogion en České Budějovice, Košice kaj Prešov. Sian psikiatrian praktikon li havis en Pelhřimov, proksime al kiu en la komunumo Rynárec li vivas kun sia familio. En 2024 estis al li aljuĝita premio „Elstara kuracisto de la Pelhřimov-regiono“.



Li estas sukcesa aŭtoro de pli ol 30 libroj, precipe pri psikologio, psikiatrio kaj spiritaj temoj, kiuj saĝe, trafe kaj humure priskribas problemojn kaj vivsituaĵojn de la nuna mondo. Pluraj el ili aperis ankaŭ en tradukoj al aliaj lingvoj. Li estas ofte invitata al ĉeĥaj televido, radio kaj ĵurnaloj por esti intervjuata kaj estas konata publika persono.



Pri Esperanto li komencis intense okupiĝi en 2009. Jam en 2010 li tradukis al la ĉeĥa la lernolibron „Esperanto per rekta metodo“ de Stano Marček (eld. KAVA-PECH, en 2024 ĈEA).

Samjare li kunfondis Esperanto-klubon Montetaro en Pelhřimov, kiu sekve en 2016 gastigis la ĈEA-Kongreson.



Kiel kuracisto li membras en UMEA kaj kiel katoliko en IKUE kaj regule kontribuas per siaj inspiraj artikoloj al la gazeto „[Dio benu](#)“ de la katolika-sekcio de ĈEA. Li iniciatis unikan esperantigon de la krucvojo kreita de Josef Bouchal inter Žirovnice kaj Počátky.



Plurfoje li celebris Esperanto-mesojn en Esperanto (unufoje dum la IJK en Liberec en 2009). Origine li estis diakono ĉe premonstratoj en la monaĥejo Želiv (tie li ricevis sian duan nomon Maxmilián) kaj sekve akiris postenon de greka-katolika pastro. Li estas edziĝinta kaj havas du filinojn, kion la koncerna eklezio ebligas.

Dum siaj prezentiĝoj en la amas-komunikiloj Max Kaŝparů ofte portas Esperanto-insignon kaj publike esprimas sian esperantistecon kaj ĝiajn motivojn, per kio li pro sia aŭtoritato subtenas prestiĝon de la Esperanto-movado. Lia faka devizo estas „Per Esperanto kontraŭ Alzheimer-malsano“. Li rekomendas la lingvon kiel efikan rimedon por trejni cerbajn funkciojn kaj riĉigi sociajn rilatojn en la (ne nur) senjora aĝo.



Li partoprenis la UK-on en Rejkjaviko en 2013 kaj laŭ siaj ebloj kontribuis ankaŭ al programoj de Esperanto-aranĝoj en Ĉeĥio (i.a. al la ĈEA-Kongreso en Kroměříž en 2017). Kunlabore kun EK Písek li dufoje realigis publikajn prelegojn en la urbo, kunorganizis la aranĝon „Bonvenigado de la somero“ en Žirovnice (2011) kaj grave meritis pri prezento de la tutŝtata migra ekspozicio „Ĉu Esperanto estas morta lingvo?“ en Jindřichův Hradec, Pelhřimov, Žirovnice kaj Dačice.

En Esperanto aperis lia libreto „Krist-naskaj demandoj kaj paradoksoj“ (KAVA-PECH 2010, trad. M. Blahuš), „Konciza psikiatria vortareto Esperanta kaj ĉeĥa“ (2012, kunlabore kun M. Malovec) kaj „Dek paŝoj al ĝojo (ĉeĥa IKUE-sekcio 2020).



En 2013 li iniciatis, financis kaj plantis Esperanto-arbon en Lipnice nad Sázavou.


*Pavla Dvořáková
teksto kaj fotoj*

REMEMORE PRI PŘEMYSL PITTER

21.6.2025 pasis 130 jaroj ekde la naskiĝo de la elstara ĉeĥa humanisto, pedagogo, socia aganto, publicisto, verkisto kaj evangelia predikisto. Li naskiĝis en 1895 en Smíchov rando de Prago kaj forpasis 17.2.1976 en Zuriko. En sia junaĝo li lernis Esperanton kaj sekve ankaŭ subtenis ĝin.

Li partoprenis la unuan mondmiliton kiel volontulo, dum kiu li fariĝis profunda kristano kaj pacifisto. En 1933 li fondis kaj estris Domon de Milič en Prago-Žižkov, kie li helpis infanojn el malriĉaj familioj, inkluzive de judaj infanoj dum la nazia reĝimo. Post la milito li organizis prizorgon por infanoj revenantaj el koncentrejoj. Ekde 1948 Pitter estis persekutata kaj devis elmigri en 1951 al Okcidenta Germanio kaj sekve al Svislando, kie li daŭrigis siajn socian kaj spiritan laboron inter rifuĝintoj.

Kune kun Olga Fierz li redaktis la ekzilan revuon „Hovory s pisateli“ (Interparoloj kun korespondantoj). En 1964 li estis honorigita kiel "Justulo inter la Nacioj" kaj postmorte ricevis la Ordenon de T. G. Masaryk. Lian 100-an vivjubileon UNESKO proklamis monda kultura datreveno. Pliaj informoj troveblas en [Vikipedio](#), en la artikolo de Karel Kraft en [Starto 2005/1](#) kaj precipe en la libro [Heroo de amo](#) (eld. KAVA-PECH 2005), verkita de Karel Kraft.



CHOCEŇ

Komence de marto okazis dutaga lingva ekzercado en klubejo de ČeFEA en Choceň, kiun mi partoprenis. Entute ĉeestis 7 partoprenantoj. Per tre amuza formo ni babilis kaj ekzercadis nian duan lingvon – Esperanton.




Kadre de ripozo ni promenis tra Choceň, kie mi neniam estis. La promenon ni

finis per vespermanĝo en restoracio „Ĉe azeno“. La restoracio estis plenplena. Nur ĉe unu el tabloj sidis iu soleca virino. Dum nia esperantlingva parolado ŝi demandis: „Ĉu vi parolas Esperante?“ Ni estis ŝokitaj. Kaj ni komune vokis: „Jes!“ Ŝi diris, ke ŝi konas la lingvon kaj ŝi ŝatus lerni ĝin. Mi vigle elŝovis la leporelon „Esperanton vi havas en poŝo“ kaj mi dediĉis ĝin al ŝi. Per tio ni tre ĝojigis ŝin. Ankaŭ ŝi plibonigis nian humoron. Kun granda plezuro ŝi ekpagis niajn trinkaĵojn. Kaj de tiu sperto sekvas la bezono – esti ĉiam pretaj porti esperantajn materialojn!

Post vespermanĝo la programo daŭris en klubejo, per prelegoj kun fervojtemo. Dua tago komenciĝis per prelego dediĉita al Karel E. Macan. Poste ni ekzercadis per amuza formo la kalkuladon. La ekzercado konsistis el „kalkulado de simioj“.

Sekvis tradukado el ĉeĥa lingvo en esperanton kaj male.



Posttagmeze ni forveturis hejmen.

Kaj restas la demando: Kiom da simioj estis? Kaj kie perdiĝis la dua simio?

Tio estas tasko por venonta ekzercado.

Aŝv.

Jak platit svazu

Fio banka Svitavy

Platit lze poštovní poukázkou A (poplatek 36 Kč do 5000 Kč) nebo převodem na účet **2800186228/2010, variabilní symbol** má celkem 10 míst - prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie a doplněné vpředu nulami, např. 00325). Číslo legitimace je uvedeno na štítku při expedici Starta. Dalších pět míst pro variabilní symbol podle účelu platby (viz seznam). Pokud platíte za klub (EK nebo sekci), uveďte své číslo legitimace a pošlete na emailovou adresu Andrey Švubové a.svubova@email.cz seznam, za koho platíte.

Seznam čísel:
(ukončení variabilního symbolu)

06940 členství ČES
06941 členství UEA
06942 předplatné Starta bez členství
06943 dary ČES a mimořádné čl. příspěvky
06944 poplatek UK
06945 kongres EEU
06946 konference/sjezd ČES
50400 komise pedagogická ILEI
50401 písemný kurs začátečníci
50402 písemný kurs pokročilí
50404 Paroliga kurso
50405 svazové zkoušky
50800 sekce nevidomých LIBE
50900 sekce zdravotníků UMEA
51000 sekce křesť. esp. KELI,
č. ú. 123 - 830 734 0217/0100
Komerční banka Poděbrady
51100 sekce katol. esp. IKUE, **ZMĚNA!**
vlastní b. ú. 1647837113/0800
51200 sekce informatiky
70100 komise pro tisk a inf.
80200 ediční fond
80300 propagace v tisku
80400 fond Tilio
80500 virtuální *adresa@esperanto.cz*

Předplatné časopisů

Předplatné časopisů zajišťuje Pavel Polnický, Lidická 939/11, 290 01 Poděbrady, polnickypavel@seznam.cz, tel. **723 672 335**.

Předplatné uhrad'te na účet u **Raiffeisenbank**, č. ú. **101 953 9617/5500**, konst. symbol 0379 a variabilní symbol uvedený u jednotlivých titulů. Pokud platíte jednou položkou za více časopisů, pošlete P. Polnickému rozpis platby.

Monato: 1480,- Kč, v.s. 07001, 12 čísel ročně, 36 stran formátu A4, rete 870,-Kč

Juna Amiko: 350,- Kč, v.s. 07004, 4 čísla ročně, 40 stran formátu A5, rete 190,-Kč

Literatura Foiro: 1500,- Kč (*1000,- Kč), v.s. 07005, 6 čísel ročně, 56 stran formátu A5 (*cena v závorce platí pro členy "Esperanta civito".)

La Ondo de Esperanto aperas dumaniere: (1) kiel ĉiutage ĝisdatigata novaĵretejo (<https://sezonoj.ru/>), kaj (2) kiel ĉiusezona almanako (kun literatura suplemento jarfine), kiu enhavas la plej gravajn tekstojn el la novaĵretejo kaj krome artikolojn, eseojn kaj beletraĵojn, verkitajn speciale por la almanako, kiu konservis la nomon "La Ondo de Esperanto". La novaĵretejo ekzistas danke al la donacoj kaj abonoj al la almanako "La Ondo de Esperanto". Malkiel la novaĵretejo, kiu estas libere legebla de ĉiu deziranto, la almanako estas legebla nur de tiuj, kiuj abonas ĝin.



Ĉi-jara Ĉantorio

22 junio 2025

**Periodikum Českého
esperantského svazu, z.s.
56. ročník**

**Redaktor: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

**starto@esperanto.cz
<http://www.esperanto.cz/starto>**

**Předplatné v Česku
(bez členství ve svazu): 200 Kč
Členská evidence a změny adres:**

**p/a Mgr. Andrea Švubová, DiS,
svubova@esperanto.cz**

**Uzávěrka příštího čísla:
15.8.2025**

-

**Organo de Ĉeĥa Esperanto-
Asocio 56-a jarkolekto**

**Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj
perantoj aŭ rekte ĉe nia Asocio**

**Abonprezo: 11 eŭroj, ekster
Eŭropo 13 eŭroj**

(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)

elektronika versio PDF 6 eŭroj

**Redaktoro: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

**Ĉeĥio, starto@esperanto.cz
<http://www.esperanto.cz/starto>**

Presis: DTP centrum, Svitavy

**Redakto-fermo de la sekva
numero: 15.8.2025**

ISSN 1212-009X

**Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.;
15.11.**

KALENDARO

Aktualaĵojn kaj unuopajn prelegojn sekvu en
Eventaservo.org kaj [Kalendaro de Esperanto.cz](http://Kalendaro.de Esperanto.cz).

2025

2025-06-22 Ĉantorio

2025-07 KELI-kongreso NULIGITA

info: polnickypavel@seznam.cz

2025-07-13/26 Unua etapo de Lančov

2025-07-21/26 [BEMI \(bicikla\) karavano](#)

de Prago al UK en Brno

(vizite en Pardubice kaj Svitavy)

info: bemi-estraro@tejo.org

2025-07-27/08-08 Dua etapo de Lančov

2025-07-26/08-02 [110-a UNIVERSALA
KONGRESO DE ESPERANTO EN BRNO](#)

<https://uk.esperanto.net/2025/duabulteno>

2025-07-26/08-02 53-a [Infana Kongreseto](#)

en Brno, info: infanakongreseto@gmail.com

2025-08-2/9 [IKUE-kongreso](#) en Brno

info: ikuekongreso@gmail.com

2025-08 Fervojista renkonto en Hranice

2025-08-08/10 Renkontiĝo en Lančov

2025-09-06 Fervojista renkonto en Choceň

2025-09-22/24 Fervojista konferenco en Ramzová ,
info: <http://ifef.wz.cz/>

2025-10-17/19 [ĈEA-kongreso](#) en Havířov

Elektio de gravaj aranĝoj eksterlande

2025-07-05/13 [59-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj](#)

en Kaunas, Litovio, info: litova.ea@mail.lt

2025-07-19/26 [58-a ILEI-Kongreso](#) en Beogrado

info: ilei.kongresoj@gmail.com

2025-07-21/31 [46-a REF](#) en Greziljono (Francio)

info: kastelo@gresillon.org

2025-07-28/08-03 [14a Kultura Esperanto-Festivalo](#)

en La Chaux-de-Fonds (Svislando)

info: kce@esperantio.net

2025-08-9/16 [98-a SAT-Kongreso](#) en Greziljono

info: kastelo@gresillong.org

2025-08-09/16 [81-a TEJO-Kongreso](#)

en Cisarua (Indonesio), info: ijk2025@tejo.org

2025-08-21/24 [42-a Pola Esperanto-Kongreso](#)

en Piotrków Trybunalski, info: rk-lodzo@wp.pl

2025-08-23/30 [91a Itala Kongreso de Esperanto](#)

en Salsomaggiore Terme, info: info@30oredoro.it

2025-09-13/20 [57-a Internacia Esperanto-Feriado](#)

apud Łądek Zdrój (apud ĉeĥa landlimo)

info: pomer@wp.pl



E-mental' en Berlino



Foto el la prelego de Petro Chrdle en la fakultato Jan Perner de la Universitato Pardubice por la studentoj de la Universitato de la tria aĝo prezentita la 25-an de aprilo 2025. Fotis Zuzana Pospíšilová.



Marcipana Pasko en Urba Muzeo



Partoprenantojn de la Aŭstria kongreso en Graz fotis Herbert Kampl.



Muzikgrupo Ŝafrda kantis en Graz ĉefhajn kantojn en traduko de V. Türk, M. Malovec kaj R. Corsetti



Partoprenantoj de la renovigita Sabla Printempo